**int,** sign of the past active participle: *aminte,*  
*having loved.*

**ont,** sign of future active participle: *amonte,*  
*being about to love.*

**ot,** sign of future passive participle: *amote,*  
*being about to be loved.*

<sup>1</sup> Fluanta akvo estas pli pura ol akvo staranta  
senmove. <sup>2</sup> Promenante<sup>a</sup> sur<sup>b</sup> la strato, mi falis.

<sup>3</sup> Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo

**movi,** *to move.*

**fali,** *to fall.*

**intenci,** *to intend.*

**riproči,** *to reproach.*

**mensogi,** *to tell a lie.*

**neniam,** *never.*

**atendi,** *to wait, expect.*

**mondo,** *world.*

**grava,** *important, grave.*

**kapti,** *to catch.*

**soldato,** *soldier.*

**konduki,** *to conduct.*

**tra,** *through.*

estas la batanto<sup>c</sup> kaj Jozefo estas la batato. <sup>4</sup> Al homo, pekinta<sup>d</sup> senintence, Dio facile pardonas.  
<sup>5</sup> Trovinte pomon, mi ĝin mangis. <sup>6</sup> La falinta homo ne povis sin levi. <sup>7</sup> Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem pli multe meritas riproĉon ; li estas nur unufoja<sup>e</sup> mensoginto, dum vi estas ankoraŭ nun

---

<sup>a</sup> Adverbial ending, because not directly connected with the subject. See Note *f*, Exercise 15.

<sup>b</sup> Observe use of preposition *sur*.

<sup>c</sup> See *Substantival Participle*, Page 40.

<sup>d</sup> This participle is adjectival in form, not because it modifies *homo* directly—an *unintentionally-sinning man*—but because it is predicative, *kiu estas* being omitted; in English, *a man who has sinned unintentionally*. But if *kIU* were the subject of a verb other than *estas*, then the participle would stand detached, and take the adverbial ending: *Al homo kiu, pekinte senintence, pentas, Dio facile pardonas*=  
*The man who, having sinned unintentionally, repents, God readily pardons.*

<sup>e</sup> Literally, a *one-time person-who-has-lied*. The person referred to has told a lie, therefore the past form, -into. In the same sentence, *mensoganto* is in the present form because it refers to some one who is a general liar; as the person speaking tells him, with commendable candor, a *still, now, all-the-time* liar.

Ciam mensoganto. <sup>8</sup> La tempo pasinta<sup>1</sup> jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. <sup>9</sup> Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. <sup>10</sup> En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo. <sup>11</sup> Aŭgusto estas mia plej amata filo. <sup>12</sup> Mono havata estas pli grava, ol havita. <sup>13</sup> Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota. <sup>14</sup> La soldatoj kondukis la arrestitojn tra la stratoj. <sup>15</sup> Li venis al mi tute neatendite. <sup>16</sup> Homo, kiun oni devas jugi, estas jugoto.

<sup>1</sup>This meaning can be expressed: *Tempo pasinta=Past time. Tempo kiu estas pasinta=Time which has passed. Tempo, pasinte, jam neniam revenos=Time, having passed, will never return.*

#### TRANSLATION 22

<sup>1</sup> Flowing water is purer than water standing still. <sup>2</sup> While walking in the street, I fell. <sup>3</sup> When Nicodemus beats Joseph, then Nicodemus is the beater and Joseph is the beaten. <sup>4</sup> God readily pardons a man who has sinned unintentionally. <sup>5</sup> Having found an apple, I ate it. <sup>6</sup> The fallen man could not raise himself. <sup>7</sup> Do not reproach your friend, for you yourself more deserve reproach; he

is only once a liar, while you are still, now, always a liar. <sup>8</sup>The past time will never return; the future time no one yet knows. <sup>9</sup>Come, we await you, Savior of the world. <sup>10</sup>In the language "Esperanto" we see the future language of the whole world. <sup>11</sup>Augustus is my most beloved son. <sup>12</sup>Money had [now] is more important than [that which has] been had. <sup>13</sup>A sparrow caught is better than an eagle to be caught. <sup>14</sup>The soldiers led the arrested persons through the streets. <sup>15</sup>He came to me quite unexpectedly. <sup>16</sup>A man whom they have to try is the accused (person to be tried).

---

The student has observed that while sometimes the translations of these Exercises follow the Esperanto text so literally as to make very poor English, this is not invariable; frequently the translation follows the thought more closely than the text. The student will find fewer parenthetical explanations as he proceeds and will rely more and more upon his own perceptions to grasp the spirit and style of Esperanto.

## EXERCISE 23

|  |   |
|--|---|
| <b>kelke</b> , <i>some</i> .   | <b>aventuro</b> , <i>adventure</i> .    |
| <b>konsideri</b> , <i>to consider</i> .  | <b>inda</b> , <i>worthy, valuable</i> . |
| <b>doto</b> , <i>dowry</i> .   | <b>palaco</b> , <i>palace</i> .         |
| <b>propra</b> , ( <i>one's</i> ) <i>own</i> .  | <b>akcepti</b> , <i>to accept</i> .     |
| <b>baldaŭ</b> , <i>soon</i> .  | <b>angulo</b> , <i>corner, angle</i> .  |
| <b>iĝ</b> , <i>to become</i> : <b>pala</b> , <i>pale</i> ; <b>paligi</b> , <i>to turn pale</i> . |   |
| <b>je</b> , <i>indefinite preposition</i> . See p. 53.   |   |

## La Feino (Fino)

<sup>1</sup> La regido, kiu vidis, ke el ŝia bušo eliris kelke<sup>a</sup> da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. <sup>2</sup> Si rakontis al li sian tutan aventuron. <sup>3</sup> La regido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis<sup>b</sup> ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi. <sup>4</sup> Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis<sup>c</sup> tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniu, kiu volis ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.

\**Kelke*. See Note b, Exercise 12.

<sup>b</sup> *Conducted away*. For, with other Esperanto adverbs and prepositions, is often thus joined to the verb instead of following it.

\**Fari*, to make; *fariĝi*, to become.

### TRANSLATION 23

#### The Fairy (Concluded)

<sup>1</sup> The prince, who saw that from her mouth issued some pearls and diamonds, begged her to tell him whence this came. <sup>2</sup> She told him her whole adventure. <sup>3</sup> The prince considered that such a gift had greater value than all which one could give as a dowry to another maiden, [and] took her away to the palace of his father, the king, where he married her. <sup>4</sup> But concerning her sister we may say that she became so hateful that her own mother drove her away from her; and the unhappy girl, having run about a great deal and having found no one who wished to receive her, soon died in a corner of the forest.

## EXERCISE 24

**salono**, *drawing-room.*

**os**, sign of future tense of verbs: **amos**, *will love.*

- <sup>1</sup> Nun li diras al mi la veron. <sup>2</sup> Hieraŭ li diris al mi la veron. <sup>3</sup> Li ĉiam diradis<sup>a</sup> al mi la veron.  
<sup>4</sup> Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron).  
<sup>5</sup> Li diros al mi la veron. <sup>6</sup> Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ<sup>b</sup> ol vi venos al mi, li diros al mi la veron). <sup>7</sup> Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. <sup>8</sup> Mi ne farus la eraron, se li antaŭe<sup>c</sup> dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron). <sup>9</sup> Kiam mi venos, diru al mi la veron. <sup>10</sup> Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron). <sup>11</sup> Mi volas diri al vi la veron. <sup>12</sup> Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron).

<sup>a</sup> Diri, *to say*; ad, suffix of continued action; diradas, continues to say, to tell.

<sup>b</sup> Antaū ol, *before than*. See Page 49.

<sup>c</sup> Observe that the conditional, or -us mood, has no time. Here, the past tense is inferred from antaūe.

### TRANSLATION 24

<sup>1</sup> Now he tells me the truth. <sup>2</sup> Yesterday he told me the truth. <sup>3</sup> He always tells me the truth. <sup>4</sup> When you saw us in the drawing-room he had already (previously) told me the truth. <sup>5</sup> He will tell me the truth. <sup>6</sup> When you come to me he will previously have told me the truth (or he will have told me the truth; or, before you come to me he will tell me the truth). <sup>7</sup> If I should ask him, he would tell me the truth. <sup>8</sup> I should not have made the mistake if he had previously told me the truth. <sup>9</sup> When I shall come, tell me the truth. <sup>10</sup> When my father comes, tell me (previously) the truth. <sup>11</sup> I wish to tell you the truth. <sup>12</sup> I wish that what I said be true (or, I wish to have told the truth).

In connection with this Exercise the student should review the conjugations of the Infinitive, Imperative and Conditional modes. See pp. 32-35.

## EXERCISE 25

|                             |                                 |
|-----------------------------|---------------------------------|
| <i>inviti</i> , to invite.  | <i>komerci</i> , to trade,      |
| <i>sekvi</i> , to follow.   | <i>konstrui</i> , to construct. |
| <i>suldi</i> , to owe.      | <i>oro</i> , gold.              |
| <i>ringo</i> , ring.        | <i>lerta</i> , skillful.        |
| <i>projekto</i> , project.  | <i>ingeniero</i> , engineer.    |
| <i>fero</i> , iron.         | <i>vojo</i> , road, way.        |
| <i>agi</i> , to act.        | <i>pastro</i> , priest, pastor. |
| <i>kameno</i> , fire-place. | <i>poto</i> , pot.              |
| <i>kaldrono</i> , kettle.   | <i>boli</i> , to boil.          |
| <i>vaporo</i> , steam.      | <i>pordo</i> , door.            |
|                             | <i>korto</i> , yard, court.     |

a)<sup>j</sup>, something made from or possessing the quality of: *malnova*, old; *malnovajo*, an old thing; *frukto*, fruit; *fruktajo*, something made from fruit.

- <sup>1</sup> Mi estas amata. <sup>2</sup> Mi estis amata. <sup>3</sup> Mi estos amata. <sup>4</sup> Mi estus<sup>a</sup> amata. <sup>5</sup> Estu amata. <sup>6</sup> Esti amata. <sup>7</sup> Vi estas lavita. <sup>8</sup> Vi estis lavita. <sup>9</sup> Vi estos lavita. <sup>10</sup> Vi estus<sup>a</sup> lavita. <sup>11</sup> Estu lavita. <sup>12</sup> Esti lavita. <sup>13</sup> Li estas invitota. <sup>14</sup> Li estis invitota. <sup>15</sup> Li estos invitota. <sup>16</sup> Li estus<sup>a</sup> invitota. <sup>17</sup> Estu invitota. <sup>18</sup> Esti invitota. <sup>19</sup> Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata<sup>b</sup> de mi. <sup>20</sup> La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi. <sup>21</sup> Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita. <sup>22</sup> Mi sciigas, ke de

nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.  
<sup>23</sup> Estu trankyla; mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ. <sup>24</sup> Mia ora ringo ne estus<sup>a</sup> tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi. <sup>25</sup> Laŭ la projekto de la ingenieroj<sup>c</sup> tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn<sup>d</sup>. <sup>26</sup> Honesta homo agas honeste. <sup>27</sup> La pastro, kiu mortis antaŭ<sup>e</sup> nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), logis longe en nia urbo. <sup>28</sup> Ĉu hodiaŭ<sup>f</sup> estas varme aŭ malvarme?  
<sup>29</sup> Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vapro; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vapro iras sur la korton<sup>g</sup>.

<sup>a</sup> The use of *estus* in Sentences 4, 10 and 16 indicates the presence of a condition or contingency, though this is not stated, as in Sentence 24. Be careful not to translate *should* by *estus* where duty is expressed—use *deves=ought*.

<sup>b</sup> The passive participle is connected with the source of the action by *de*. See Rule VI, Page 15.

<sup>c</sup> This word means *civil engineer*. The word for locomotive engineer is *mašinisto*, or a more precise term, *lokomotivisto*. *Fervojo* (*iron-way*) is the Esperanto term for railway.

<sup>d</sup> Do not forget that where a preposition is omitted the accusative case is used. Here, the absent preposition is *dum*.

<sup>e</sup> *Antaŭ nelonge* is the expression usually used for *not long ago, a short time ago, recently*.

<sup>f</sup> *Hodiaŭ, hieraŭ* and *morgaŭ* are not nouns, but adverbs. Hence the adverbial form of *varme* and *malvarme*. The noun form, when necessary so to speak of *today, tomorrow*, is *la hodiaŭa tago, la morgaŭa tago*.

<sup>g</sup> Accusative to show direction.

## TRANSLATION 25

<sup>1</sup>I am loved. <sup>2</sup>I was loved. <sup>3</sup>I shall be loved.  
<sup>4</sup>I should be loved [if.....]. <sup>5</sup>Be loved. <sup>6</sup>To be  
loved. <sup>7</sup>You have been washed. <sup>8</sup>You had been  
washed. <sup>9</sup>You will have been washed. <sup>10</sup>You  
would have been washed. <sup>11</sup>Be washed (past).  
<sup>12</sup>To be washed. <sup>13</sup>He is to be invited. <sup>14</sup>He was  
to be invited. <sup>15</sup>He will be (about) to be invited.  
<sup>16</sup>He would be (about) to be invited. <sup>17</sup>Be invited  
(future). <sup>18</sup>To be (about) to be invited. <sup>19</sup>This  
article (of commerce) is always willingly purchased  
by me. <sup>20</sup>The overcoat has been bought by me,  
consequently it belongs to me. <sup>21</sup>When your house  
was being built, my house had already been built  
for a long time. <sup>22</sup>I make [it] known that from  
now on the debts of my son will not be paid by me.  
<sup>23</sup>Be at ease; my entire debt will have been paid  
to you soon. <sup>24</sup>My gold ring would not be so long  
searched for if it had not been so cleverly hidden  
by you. <sup>25</sup>According to the project of the engi-  
neers, this railway is to be built in the course of  
two years, but I think that it will be under con-  
struction more than three years. <sup>26</sup>An honest man  
acts honestly. <sup>27</sup>The priest who died recently had  
lived a long time in our city. <sup>28</sup>Is it warm or cold  
today? (or, is today warm or cold?) <sup>29</sup>On the  
hearth between two pots stands an iron kettle; from  
the kettle, in which is (finds itself) boiling water,  
issues steam; through the window, which is near  
the door, the steam goes into the yard.

## EXERCISE 26

|                              |   |
|------------------------------|---|
| <i>ekster</i> , outside.     | <i>vojaĝi</i> , <i>voyage</i> , <i>travel</i> . |
| <i>piedo</i> , foot.         | <i>benko</i> , <i>bench</i> .                   |
| <i>meti</i> , to put, place. | <i>kanapo</i> , <i>sofa</i> , <i>lounge</i> .   |
| <i>muso</i> , mouse.         | <i>lito</i> , <i>bed</i> .                      |
| <i>super</i> , over, above.  | <i>aero</i> , <i>air</i> .                      |
| <i>kafo</i> , coffee.        | <i>teo</i> , <i>tea</i> .                       |
| <i>sukero</i> , sugar.       | <i>kremo</i> , <i>cream</i> .                   |
| <i>interne</i> , within.     | <i>fianĉo</i> , <i>betrothed person</i>         |
| <i>hirundo</i> , swallow.    | <i>trans</i> , across.                          |
| <i>rivero</i> , river.       | <i>estro</i> , chief.                           |
| <i>atenta</i> , attentive.   | <i>kvankam</i> , although.                      |
| <i>dubi</i> , to doubt.      | <i>estimi</i> , to esteem.                      |
| <i>fi!</i> <i>fie!</i>       | <i>abomeno</i> , abomination.                   |
|                              | <i>rapida</i> , rapid, quick.                   |

*et*, diminution of degree or size: *malvarma*, cold; *malvarmeta*, cool; *ridi*, to laugh; *rideti*, to smile.

<sup>1</sup> Kie vi estas? <sup>2</sup> Mi estas en la ĝardeno. <sup>3</sup> Kien vi iras? <sup>4</sup> Mi iras en la ĝardenon. <sup>5</sup> La birdo flugas en la ĉambro (=gi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi). <sup>6</sup> La birdo flugas en la ĉambron (=gi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin). <sup>7</sup> Mi vojagas en Hispanujo. <sup>8</sup> Mi vojagas en Hispanujon. <sup>9</sup> Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo. <sup>10</sup> Mi metas la manon sur la

tablon<sup>a</sup>. <sup>11</sup> El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun gi kuras sub la lito. <sup>12</sup> Super la tero sin trovas<sup>b</sup> aero. <sup>13</sup> Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero<sup>c</sup>, sed sen kremo. <sup>14</sup> Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne. <sup>15</sup> En la salono estis neniu krom li kaj lia fiancino. <sup>16</sup> La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj. <sup>17</sup> Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de miaestro. <sup>18</sup> Kiam li estas ĉe<sup>d</sup> mi li staris tutan horon<sup>e</sup> apud la fenestro. <sup>19</sup> Li diras, ke mi estas atenta. <sup>20</sup> Li petas, ke mi estu<sup>f</sup> atenta. <sup>21</sup> Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu<sup>g</sup> vi estas feliĉa. <sup>22</sup> Se vi scius, kiu li estas, vi lin pli estimus. <sup>23</sup> Se li jam venis, petu lin al mi. <sup>24</sup> Ho, Dio! kion vi faras! <sup>25</sup> Ha, kiel bele! <sup>26</sup> For de tie ĉi! <sup>27</sup> Fi, kiel abomene! <sup>28</sup> Nu, iru pli rapide!

<sup>a</sup> I move my hand toward the table in the act of placing it upon the table. Hence, n for direction. Note carefully this sign of direction in Sentences 4, 6, 8, 10, 11, 16.

<sup>b</sup> Observe the use of *sin trovas* here, as in Sentence 29. Exercise 25. This is often used instead of *estas*. A similar form is *sin turnu al*, to address oneself to, to turn to. *Ĉiuj sin turnu al la redaktoro*=Let all address the editor.

<sup>c</sup> Sukero here, because *kun* is a preposition. Without the preposition, it would be *teon kaj sukeron*.

<sup>d</sup> Esperanto often uses the pronoun thus: *Ĉe mi*=At my house. *Ĉe vi*=At your house.

See Note c, Exercise 25.

<sup>e</sup> This meaning, in English, has two forms of expression—*he asks that I be attentive*, or *he asks me to be attentive*. In Esperanto the former is invariably used.

<sup>8</sup> Dubi in any form is followed by ēu to connect a proposition containing a verb, and by pri when followed by a noun: Mi dubas ēu vi estas fidela=*I doubt whether you are faithful* Mi dubas pri via fideleco=*I doubt (concerning) your fidelity.*

### TRANSLATION 26

- <sup>1</sup> Where are you? <sup>2</sup> I am in the garden.
- <sup>3</sup> Where are you going? <sup>4</sup> I am going into the garden. <sup>5</sup> The bird flies in the room (it is in the room and flies about in it). <sup>6</sup> The bird flies into the room (it is outside the room and flies into it). <sup>7</sup> I am traveling in Spain. <sup>8</sup> I am traveling into Spain.
- <sup>9</sup> I sit on a chair and keep my feet upon a stool.
- <sup>10</sup> I place my hand upon the table. <sup>11</sup> From under the sofa the mouse ran under the bed, and now it runs about under the bed. <sup>12</sup> Above the earth is (finds itself) air. <sup>13</sup> Instead of coffee he gave me tea with sugar, but without cream. <sup>14</sup> I stand outside the house, and he is within. <sup>15</sup> In the drawing-room was nobody except him and his fiancee.
- <sup>16</sup> The swallow flew across the river, because beyond the river were other swallows. <sup>17</sup> I am remaining here according to the orders of my chief. <sup>18</sup> When he was at my house he stood a whole hour at the window. <sup>19</sup> He says that I am attentive. <sup>20</sup> He asks that I be attentive. <sup>21</sup> Although you are rich, I doubt that (whether) you are happy. <sup>22</sup> If you knew who he is you would esteem him more. <sup>23</sup> If he has already come, ask him to come to me. <sup>24</sup> Oh God! what are you doing? <sup>25</sup> Ah, how beautiful!
- <sup>26</sup> Away from here! <sup>27</sup> Fie, how abominable! <sup>28</sup> Well, go faster!

## EXERCISE 27

|                                      |                                  |
|--------------------------------------|----------------------------------|
| <i>artikolo, article.</i>            | <i>tiam, then.</i>               |
| <i>objekto, object.</i>              | <i>tia, such, such a</i>         |
| <i>kompreni, understand.</i>         | <i>ekzemplo, example.</i>        |
| <i>polo, Pole.</i>                   | <i>necesa, necessary.</i>        |
| <i>vokalo, vowel.</i>                | <i>prepozicio, preposition.</i>  |
| <i>kunmeti, to compound.</i>         | <i>simpla, simple.</i>           |
| <i>ligi, to bind.</i>                | <i>radiko, root.</i>             |
| <i>soni, to sound.</i>               | <i>klara, clear.</i>             |
| <i>postuli, claim, require.</i>      | <i>gramatiko, grammar.</i>       |
| <i>nacio, nation.</i>                | <i>diversa, diverse, various</i> |
| <i>ſipo, ship.</i>                   | <i>aboni, to subscribe.</i>      |
| <i>matenmangi, to eat breakfast.</i> |                                  |

<sup>1</sup> La artikolo *la* estas uzata <sup>a</sup>tiam<sup>b</sup>, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. <sup>2</sup>Gia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj. <sup>3</sup>La personoj, kiuj<sup>b</sup> ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa. <sup>4</sup>Anstataŭ *la* oni povas ankaŭ diri *l'*, (sed nur post prepozicio, kiu finigas per vokalo). <sup>5</sup>Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunkligado de vortoj; one prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e., la radikon kune kun *gia* gramatika finigo. <sup>6</sup>Ekzemploj: skribtable aŭ skribotablo (table, sur kiu oni skribas); internacia (=kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (de la tuta mondo); unutaga

(kiu daŭras unu tagon); unuataga (kiu estas en la unua tago); vaporſipo (=ſipo, kiu sin movas per vaporo); matenmangi, tagmangi, vespermangi; abonpago (=pago por la abono).

<sup>a</sup> Observe this use of *tiam kiam*=*then when*. In English we use *when* alone, and frequently in Esperanto simply *kiam*. *Tiam kiam* is more definite and emphatic.

<sup>b</sup> Note that *kiuj* is plural because it represents more than one person.

### TRANSLATION 27

<sup>1</sup> The article *la* is used when we speak of persons or things known. <sup>2</sup> Its use is the same as in the other languages. <sup>3</sup> Persons who do not understand the use of the article (for example Russians or Poles who do not know another language beside their own), may at first not use the article at all, for it is convenient but not necessary. <sup>4</sup> Instead of *la* we can also say *l'* (but only after a preposition which ends with a vowel). <sup>5</sup> Compound words are formed by simple junction of words ; we generally take the pure roots, but if euphony or clearness demands, we can also take the whole word ; i. e., the root together with its grammatical ending : <sup>6</sup> Examples : *skribtable*, or *skribotablo*, a table on which one writes ; *internacia*, that which exists between or among various nations ; *tutmonda*, of the whole world ; *unutaga*, lasting one day ; *unuataga*, of the first day ; *vaporſipo*, a ship which moves by steam ; *matenmangi*, *tagmangi*, *vespermangi*, to breakfast, to dine, to eat supper ; *abonpago*, payment for subscription.

## EXERCISE 28

|   |                                   |
|---|-----------------------------------|
| <i>iam, at any time, ever</i>                       | <b>nominativo, nominative.</b>    |
| <i>akuzativo, accusative</i>                        | <i>tie, there.</i>                |
| <i>dependi, to depend.</i>                          | <b>kaŭzo, cause.</b>              |
| <i>esprimi, to express.</i>                         | <b>direkti, to direct.</b>        |
| <i>celi, to aim.</i>                                | <b>egala, equal.</b>              |
| <i>ia, any kind of.</i>                             | <b>veturi, to journey, travel</b> |
| <i>flanko, side.</i>                                | <b>dekstra, right-hand.</b>       |
| <i>neniel, in no way.</i>                           | <b>nek....nek, neither...nor</b>  |
| <i>dis' same as the English prefix <i>dis</i> :</i> | <b>semi, sow;</b>                 |
| <i>dissemi, to scatter broadcast, disseminate.</i>  |                                   |

<sup>1</sup> Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. <sup>2</sup> Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. <sup>3</sup> Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorton la finon *n*; sekve: *tie* (=en tiu loko), *tien* (=al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras "la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon," kaj la vortoj "ĝardenon," "tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj "en" kaj "sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volas esprimi direkton, t. e. montri, ke la

birdo ne sin trovis antaŭe en la ĝardeno kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri ke la ĝardeno kaj la tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzas la finiĝon *n* tute<sup>a</sup> egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. <sup>4</sup>Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). <sup>5</sup>Mi restos hodiaŭ dome. <sup>6</sup>Jam estas tempo iri domen. <sup>7</sup>Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren kaj li iris maldekstren. <sup>8</sup>Flanken, sinjoro! <sup>9</sup>Mi konas nenion en tiu ĉi urbo. <sup>10</sup>Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. <sup>11</sup>Mi renkontis nek lin, nek<sup>b</sup> lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton).

<sup>a</sup>Egale is here used where one would expect same.

<sup>b</sup>Note nek.....nek, translated *neither.....nor*. A similar form, though practically obsolete, is sometimes used in English: *nor voice nor sound*.

### TRANSLATION 28

- <sup>1</sup> All prepositions, in themselves, always require only the nominative. <sup>2</sup>If we ever, after a preposition, use the accusative, the accusative there depends not on the preposition, but on other causes.
- <sup>3</sup> For example, to express direction, we add to the

word the ending *n*; consequently, *tie*, in that place: *tien*, to that place; similarly, we also say "the bird flew into the garden, upon the table"; and the words "garden," "table," here stand in the accusative not because the prepositions "in" and "on" require this, but only because we wish to express direction; i. e., to show that the bird was not previously in the garden and flew about there, but that it flew from another place into the garden, upon the table (we wish to show that the garden and table were not the place of the flying, but only the goal of the flight); in such cases we use the accusative just the same, whether any preposition is there or not. <sup>4</sup>Tomorrow I shall go to Paris. <sup>5</sup>I shall remain in the house today. <sup>6</sup>It is already time to go home. <sup>7</sup>We separated and went in different directions; I went to the right and he went to the left. <sup>8</sup>To one side, sir! <sup>9</sup>I know no one in this city. <sup>10</sup>I can in no way understand what you are saying. <sup>11</sup>I met neither him nor his brother (or, I did not meet him, nor his brother).

## EXERCISE 29

|                                   |                                   |
|-----------------------------------|-----------------------------------|
| <i>senco, sense.</i>              | <i>komuna, common.</i>            |
| <i>ebla, possible.</i>            | <i>ofte, often.</i>               |
| <i>ridi, to laugh.</i>            | <i>lasta, last, latest.</i>       |
| <i>sopiri, to sigh, long for.</i> | <i>regulo, rule.</i>              |
| <i>verbo, verb.</i>               | <i>obei, to obey.</i>             |
|                                   | <i>permesi, to permit, allow.</i> |

<sup>1</sup> Se ni bezonas<sup>a</sup> uzi prepozicion, kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion *je*. <sup>2</sup> Sed estas bone uzi la vorton *je* kiel eble pli<sup>b</sup> malofte. <sup>3</sup> Anstataŭ la vorto *je* ni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio. <sup>4</sup> Mi ridas je lia naiveco ( aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon) <sup>5</sup> Je la lasta fojo mi vidis lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon). <sup>6</sup> Mi veturnis du tagojn kaj unu nokton. <sup>7</sup> Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon). <sup>8</sup> El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas

<sup>a</sup> Note indicative mode following *se*. The need of a preposition is not a matter of doubt. See Note *e*, Exercise 20.

<sup>b</sup> Another peculiar Esperanto form, very frequently used: *Kiel eble plej frue, kiel eble plej bone, kiel eble plej multe.*

Ciam uzi la akuzativon. <sup>9</sup> Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro"). <sup>10</sup> Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermisas; ekzemple: ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la malamikon," sed ni devas ciam diri "pardoni al la malamiko lian kulpdon."

#### TRANSLATION 29

<sup>1</sup> If we need to use a preposition and the sense does not show us what preposition to use, then we can use the common preposition *je*. <sup>2</sup> But it is well to use the word *je* as seldom as possible. <sup>3</sup> Instead of the word *je* we can also use the accusative without a preposition. <sup>4</sup> I laugh at his simplicity. <sup>5</sup> The last time I saw him at your house. <sup>6</sup> I travelled two days and one night. <sup>7</sup> I sigh for my lost happiness. <sup>8</sup> From the said rule it follows that if, concerning any verb, we do not know whether or not it requires the accusative after it (i. e. whether or not it is transitive) we can always use the accusative. <sup>9</sup> For example, we can say "to obey 'to' the father" and "to obey the father." <sup>10</sup> But we do not use the accusative when the clearness of sense forbids this; for example, we can say "to pardon 'to' the enemy" and "to pardon the enemy"; but we should always say "to pardon to the enemy his fault."

## EXERCISE 30

|                                |                                  |
|--------------------------------|----------------------------------|
| <i>ia, of any kind.</i>        | <i>konsili, counsel, advise.</i> |
| <i>ial, for any cause.</i>     | <i>serio, series.</i>            |
| <i>iam, at any time, ever.</i> | <i>pronomo, pronoun.</i>         |
| <i>ie, anywhere.</i>           | <i>adverbo, adverb.</i>          |
| <i>iel, in any way.</i>        | <i>rilati, to be related to.</i> |
| <i>ies, anyone's.</i>          | <i>prefikso, prefix.</i>         |
| <i>io, anything.</i>           | <i>ajn, ever.</i>                |
| <i>iom, any quantity.</i>      | <i>diferenci, to differ.</i>     |
| <i>iu, anybody, somebody.</i>  | <i>helpi, to help.</i>           |
|                                | <i>sufikso, suffix.</i>          |

<sup>1</sup> *Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu.* <sup>2</sup> La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni<sup>a</sup>, ĉar el ili ĉiu povas fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj. <sup>3</sup> Se ni aldonas la literon *k* ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn : *kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu.* <sup>4</sup> Se ni aldonas la literon *t*, ni ricevas vortojn montrajn : *tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu.* <sup>5</sup> Aldon-

---

<sup>a</sup>El, when used as a prefix, is sometimes translated *thoroughly*, though this is not its literal sense. Ellerni, *to learn out, to study out; ellabori, to work out.*

ante la literon *et* ni ricevas vortojn komunajn : *tia*, *tial*, *tiam*, *tie*, *tiel*, *ties*, *tio*, *tiom*, *tiu*. <sup>6</sup>Aldonante la prefikson *nen* ni ricevas vortojn neajn : *nenia*, *nenial*, *neniam*, *nenie*, *neniel*, *nenies*, *nenio*, *neniom*, *neniu*. <sup>7</sup>Aldonante al la vortoj montraj la vorton *ti* ni ricevas montron pli proksiman ; ekzemple : *tiu*, pli malproksima, *tiu ti* (aŭ *ti tiu*) pli proksima ; *tie*, malproksime, *tie ti* aŭ *ti tie*, proksime. <sup>8</sup>Aldonante al la vortoj demandaj la vorton *ajn* ni ricevas vortojn sendiferencajn : *kia ajn*, *kial ajn*, *kiam ajn*, *kie ajn*, *kiel ajn*, *kies ajn*, *kio ajn*, *kiom ajn*, *kiu ajn*. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finigoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj) ; ekzemple : *tiama*, *tiama*, *kioma*, *tiea*, *ti-tiea*, *tieulo*, *tiamulo*, k. t. p. (=kaj tiel plu).

In connection with this lesson, the student should review what is said of Correlative Words, pp. 70-73. A few explanations are added here :

*Tia* is the demonstrative of quality, translated *that, such a, such kind*. With the relative, *kia*, it translates *such as*. Also, it is used as a demonstrative article, in the sense of *the* for the purpose of giving added force, just as *unu* is similarly used in a less definite sense. (See Note *a*, Exercise 11). In this sense, it loses its significance of quality, and may be followed by *kiel*, the relative of manner. In Exercise 27,

Sentence 2, we have *tia sama kiel*, which is correct, because *tia* means *the*. But we must not say *tia bona kiel*, the sense here being *as good as*, and the correct form *tiel bona kiel*.

**Io, tio, kio, ĉio, nenio.** These all refer to objects and are not used as modifying words. They indicate the thing itself. *Kio estas tio?* *Nenio*=*What is that? Nothing.* But if we wish to use the correlatives as modifying words, we say: *Ia birdo*=*Any kind of bird.* *Ĉiuj birdoj*=*All birds.*

**Ĉiu** means each, or every, but does not mean all, as do **Ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉiom**, etc. **Iu** and the other four words of this series express individuality, but refer, when not otherwise specified, to persons. Hence, to express plurals, **ĉiuj, kiuj, tiuj** are the correct forms.

### TRANSLATION 30

<sup>1</sup> Some kind, for some reason, some time, somewhere, somehow, somebody's, something, some quantity, somebody. <sup>2</sup> The nine words shown we advise [the student] to learn thoroughly, because from them everyone can make for himself a large series of other pronouns and adverbs. <sup>3</sup> If we add to them [as a prefix] the letter *k*, we obtain interrogative or relative words: what kind, why, when, where, how, whose, what (thing), how much, who. If we add the letter *t* we get demonstrative words: such, therefore, then, there, thus, that person's,

that, that much, that person. <sup>6</sup> Adding the letter *c* we get collective words: each and every kind, for every reason, always, everywhere, in every way, everybody's, everything, all, everyone. <sup>6</sup> Adding the prefix *nen*, we obtain negative words: no such, for no reason, never, nowhere, nohow, no one's, nothing, none, nobody. <sup>7</sup> Adding to the demonstrative words the word *ti*, we obtain a meaning of proximity; for example: *tiu*, that, *tiu ti*, this; *tie*, there, *tie ti*, here. <sup>8</sup> Adding to the interrogative words the word *ajn*, we get indifferent words: whatever kind of, for whatever reason, whenever, wherever, however, whosoever, whatever, whatever quantity, whoever. <sup>9</sup> Besides this, from these words we can make still other words, with the help of the grammatical endings and other words (suffixes); for example: contemporaneous (existing then), eternal, how much, there, a person living there or being present, a contemporary or person of that time.

## EXERCISE 31

|                                |                             |
|--------------------------------|-----------------------------|
| <i>humoro, humor.</i>          | <i>fermi, to shut.</i>      |
| <i>korpo, body.</i>            | <i>animo, soul.</i>         |
| <i>kontrakti, to contract.</i> | <i>plenumi, to fulfill.</i> |
| <i>bruli, to burn..</i>        | <i>ligno, wood.</i>         |
| <i>materialo, material.</i>    | <i>bastono, stick.</i>      |
| <i>tegmento, roof.</i>         | <i>funto, pound.</i>        |
| <i>koloro, color.</i>          | <i>supre, above, upper.</i> |
| <i>telero, plate.</i>          | <i>tero, earth.</i>         |
| <i>kesto, chest, box.</i>      | <i>lipo, lip,</i>           |
| <i>haro, hair.</i>             | <i>griza, gray.</i>         |
|                                | <i>vango, cheek.</i>        |

*ist, person occupied with: maro, sea; maristo, sailor.*

<sup>1</sup> Lia kolero longe daŭris. <sup>2</sup> Li estas hodiaŭ en kolera humoro. <sup>3</sup> Li koleras kaj insultas. <sup>4</sup> Li fermis kolere la pordon. <sup>5</sup> Lia filo mortis kaj estas nun malviva. <sup>6</sup> La korpo estas morta, la animo estas senmorta. <sup>7</sup> Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon. <sup>8</sup> Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable. <sup>9</sup> Ni faris la kontrakton ne skribi, sed parole. <sup>10</sup> Li estas bona parolanto. <sup>11</sup> Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo. <sup>12</sup> Li logas ekster la urbo. <sup>13</sup> La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno. <sup>14</sup> Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi

dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro.  
<sup>15</sup> Kia granda brulo! kio brulas? <sup>16</sup> Ligno estas bona brula materialo. <sup>17</sup> La fera bastono, kiu kuſis en la forno, estas nun brule<sup>a</sup> varmega. <sup>18</sup> Cu li donis al vi jesan respondon, aŭ nean? <sup>19</sup> Li eliris el<sup>b</sup> la dormoĉambro kaj eniris en la mangoĉambron. <sup>20</sup> La birdo ne forflugis; ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton. <sup>21</sup> Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. <sup>22</sup> Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni. <sup>23</sup> Li portas rozkoloran<sup>c</sup> superveston kaj teleroforman ĉapelon. <sup>24</sup> En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj. <sup>25</sup> Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj.

\* In Sentences 1, 2, 3, 4, kolero, kolera, koleras, kolere; in 15, 16, 17, brulo, brulas, brula, brule. These sentences are designed to show with what facility an Esperanto root may be used as a noun, adjective, verb or adverb. To add the participles in their adjectival, substantival and adverbial forms, with the variations and degrees of meaning made possible by the use of affixes—it would puzzle the expert Esperantist to measure the possible range of expression.

<sup>b</sup>Eliris el, deflugis de, alflugis al, surflugis sur. See Note c, Exercise 8.

<sup>c</sup>This lesson contains a number of compound words. The student may at first find it difficult to distinguish these at sight, but he will soon "catch the spirit" of Esperanto. Failing in this, he will search the vocabularies in vain for seeming roots which are only simple combinations.

## TRANSLATION 31

<sup>1</sup> His anger lasted a long time. <sup>2</sup> He is today in an angry mood. <sup>3</sup> He is angry and is insulting. <sup>4</sup> He shut the door angrily. <sup>5</sup> His son died and is now lifeless. <sup>6</sup> The body is mortal, the soul is immortal. <sup>7</sup> He is mortally ill, he will not live more than one day. <sup>8</sup> He speaks and his speech flows sweetly and agreeably. <sup>9</sup> We made the contract not in writing, but verbally. <sup>10</sup> He is a good speaker. <sup>11</sup> Standing outside, he could see only the outside of our house. <sup>12</sup> He lives outside the city. <sup>13</sup> The exterior of this man is better than his interior. <sup>14</sup> He did at once what I wished, and I thanked him for the immediate fulfillment of my desire. <sup>15</sup> What a big blaze! What is burning? <sup>16</sup> Wood is good burning material. <sup>17</sup> The iron rod which lay in the furnace is now burning hot. <sup>18</sup> Did he give you an affirmative or a negative reply? <sup>19</sup> He went out of the bed-room and entered the dining-room. <sup>20</sup> The bird did not fly away; it only flew down from the tree, flew to the house and lit upon the roof. <sup>21</sup> For every pound of tea purchased, this dealer adds free a pound of sugar. <sup>22</sup> A text-book one ought not to read through, but to learn through. <sup>23</sup> He wears a rose-colored gown and a mortar-board hat. <sup>24</sup> In my writing-table are four drawers. <sup>25</sup> His mustache is grayer than his whiskers.

## EXERCISE 32

|                           |                               |
|---------------------------|-------------------------------|
| <b>teatro, theater.</b>   | <b>okupi, to occupy.</b>      |
| <b>maniero, manner.</b>   | <b>mehaniko, mechanics.</b>   |
| <b>hemio, chemistry.</b>  | <b>diplomatio, diplomacy.</b> |
| <b>fiziko, physics.</b>   | <b>scienco, science.</b>      |
| <b>glaso, glaso.</b>      | <b>nigra, black.</b>          |
| <b>drapo, cloth.</b>      | <b>signifi, to signify.</b>   |
| <b>ovo, egg.</b>          | <b>bordo, shore.</b>          |
| <b>maro, sea.</b>         | <b>amaso, crowd.</b>          |
| <b>aŭtuno, autumn.</b>    | <b>lando, land, country.</b>  |
| <b>suferi, to suffer.</b> | <b>najbaro, neighbor.</b>     |
|                           | <b>mezuri, to measure.</b>    |

<sup>1</sup> Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas<sup>2</sup> baldaŭ teatrajn manierojn. <sup>2</sup> Kiu okupas sin je mehaniko, estas mehanikisto, kaj kiu okupas sin je hemio, estas hemiisto. <sup>3</sup> Diplomiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem. <sup>4</sup> La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografajon al mia patro. <sup>5</sup> Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino. <sup>6</sup> Alportu al mi metron da nigra

drapo. (Metro de drapo signifus metron, kiu kuſis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo).<sup>7</sup> Mi aĉetis dekon da ovoj. <sup>8</sup> Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo. <sup>9</sup> Sur la bordo de la maro staris amaso da<sup>b</sup> homoj. <sup>10</sup> Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn. <sup>11</sup> Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj. <sup>12</sup> Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj<sup>c</sup>, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. <sup>13</sup> En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. <sup>14</sup> "Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifion de mezuro.

<sup>a</sup> Note the use of ricevas where the inclination would be to use akiras. The latter would mean that he desired or cultivated the manner, rather than that it simply "stuck to him," and in some instances at least would be fully appropriate.

<sup>b</sup> If the student will thoroughly study the uses of da in this exercise he should never err regarding its use.

<sup>c</sup> Sentas sin feliĉaj=Feel themselves happy. Feliĉaj is nominative, being a predicative adjective. Supplying the full sense, we have sentas sin esti feliĉaj. See also Sentence 7, Exercise 33.

### TRANSLATION 32

<sup>1</sup>A theater-lover often visits the theater, and soon acquires theatrical manners. <sup>2</sup> He who occu-

pies himself with mechanics is a mechanic, and he who occupies himself with chemistry is a chemist.  
<sup>3</sup>A diplomat we can call *diplomato*, but a physician we cannot call *fiziko*, because *fiziko* is the name of the science itself. <sup>4</sup>The photographer photographed me and I sent my photograph to my father. *Glaso de vino* is a glass in which was previously wine, or which one uses for wine; *glaso da vino* is a glass full of wine. <sup>5</sup>Bring me a meter of (*da*) black cloth (*metro de drapo* would mean a meter which lay on the cloth, or which is used for cloth).  
<sup>7</sup>I bought ten eggs. <sup>8</sup>This river is two hundred kilometers long. <sup>9</sup>On the shore of the sea stood a crowd of people. <sup>10</sup>Many birds fly in the autumn to warmer countries. <sup>11</sup>Upon the tree were many birds. <sup>12</sup>Some people feel happiest when they witness the sufferings of their neighbors. <sup>13</sup>In the room sat only a few people. <sup>14</sup>*Da* after a word shows that this word has a sense of measure.

## EXERCISE 33

|  |                            |
|--|----------------------------|
| <i>mezo, middle.</i>   | <i>kreski, to grow.</i>    |
| <i>dika, thick, fat.</i>   | <i>larga, broad.</i>       |
| <i>lumo, light.</i>  | <i>mola, soft.</i>         |
| <i>turmenti, to torment.</i>   | <i>senti, to feel.</i>     |
| <i>beni, to bless.</i>   | <i>nobla, noble.</i>       |
| <i>rekta, straight.</i>  | <i>kurba, curved.</i>      |
| <i>kredi, to believe.</i>  | <i>renversi, to upset.</i> |
| <i>monto, mountain.</i>  | <i>kampo, field.</i>       |
| <i>koko, cock, chicken.</i>  | <i>nepo, grandson.</i>     |
| <i>duonpatro, stepfather.</i>  | <i>bovo, ox</i>            |
| <i>bo, relative by marriage:</i> <i>patrino, mother;</i> <i>bo-patrino, mother-in-law.</i> |                            |

<sup>1</sup> Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda; li estas de meza kresko. <sup>2</sup> Li estas tiel dika<sup>a</sup>, ke li ne povas trairi tra nia mal-larga pordo. <sup>3</sup> Haro estas tre maldika. <sup>4</sup> La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo. <sup>5</sup> Tiu ĉi malfreſa pano estas malmola, kiel ŝtono. <sup>6</sup> Malbonaj infanoj amas turmenti

---

<sup>a</sup> Dika, usually translated *thick*, here means *thick* in a sense not often thus expressed in English. Careful English is *stout*, while a popular and expressive Americanism is *fat*.

